



PILO-PRESS

Internacia
Informservo

N-ro 30/76 - 26 jul 1976
Aperas ĉiusemajne

Sonraportojn

el Ateno de la

UK elsendos

Radio Varsovio

lunde, 2.8.76

je la 6-a horo

sur ondoj 41 m, 49 m, 200 m

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

26 julio 1976 - Esperanto 89-jara

Nürnberg (pp) - La 26-an de julio 1887 aperis en Varsovio la Unua Libro de Esperanto sub la titolo "Dr. Esperanto. Mejdunarodnyi Jazyk. Predislovie i polnij učebnik" (Traŭko de la rusa titolo: D-ro Esperanto. Internacia Lingvo. Antaŭparolo kaj Plena lernolibro.) La libro, presita ĉe la tipo-litografejo de H. Kelter, Strato Novolipie n-ro 11, konsistas el 40 paĝoj, kovrilo kaj granda folio kun Esperanta-rusa vortaro.

Estas domaĝe, ke tiu grava dato, ja la plej grava, en la historio de Esperanto ne fariĝis pli populara. Tiu dato, la apero de la unua libro de Esperanto, devus esti la plej alta festotago de la esperantistaro. Antaŭ unu jaro faris ĉi-rilatan proponon Andrzej Pettyn en elsendo de Pola Radio, sed ĝi restis sen reeĥo, kiel multaj jam antaŭe.

Zamenhof mem ne taksis ĉi tiun daton grava - ja li eĉ ne plu memoris la precizan daton de la eliro de la libro -, por li pli signifoplena estis la 17-a de decembro 1878 kiam unua rondeto de kunlernantoj parolis en la pra-Esperanta "Lingve Universala".

La demando de komuna festotago de esperantistoj en la tuta mondo jam ekestis frue en la historio de Esperanto. Kaj Zamenhof diris pri tio sian opinion en letero de la 1-a de majo 1906 al la redaktoro de Germana Esperantisto, Jean Borel.

La letero tekstas: "Kara Sinjoro Redaktoro! Mi legis en la 'Germana Esperantisto' la proponon elekti iun komunan festotagon por la esperantistoj. La ideo per si mem ŝajnas al mi bona, sed mi ne povas aprobi la proponon, ke por tiu ĉi festotago oni elektu mian tagon de naskiĝo. Se la ideo per si mem estos akceptita de la esperantistoj, tiam estos necese elekti iun alian tagon, ekzemple:

- a) la tagon de malfermo de la unua kongreso esperantista;
- b) aŭ la unuan tagon de la kalendara printempo (por la norda duonglobo) kiel simbolon de la printempo, kiun nia afero promesas al la homaro;
- c) aŭ la tagon en kiu en la jaro 1878 la unua rondeto esperantista proklamis la finitecon kaj la oficialan komencon de ekzistado de la lingvo Esperanto (17 de Decembro);
- d) aŭ iun alian tagon laŭ elekto de la esperantistoj."

Malgraŭ la malrekomendo de Zamenhof lia naskiĝtago fakte fariĝis komuna festo- kaj memortago de la esperantistoj.

Post 11 jaroj la esperantistoj do povos festi la 100-an datrevenon de la apero de la Unua Libro de Esperanto. Tio vere estos grava jubileo kaj ŝajnas al mi ke ni jam nun devas komenci pripensi kiamaniere ni celebros tiun daton kaj ni devas komenci prepari la necesajn paŝojn. Por montri la vivantecon de Esperanto ne nur devos okazi solenaĵoj, kunvenoj ktp., sed devos aperi novaj lernolibroj, modernaj, vortaroj aktualaj, laŭmodaj informiloj, specialaj numeroj de Esperanto-revuo. Kaj tiu dato estos opurtuna instigi la poŝtajn administraciojn por ke ili eldonu specialan memorigan poŝtmarkon pri Esperanto.

Letero al la redakcio

Ofenbaĥo, 1976-07-022

Ekde certa tempo nia mond vasta movado ekkonscias pri la fakto ke mankas lerniloj kaj vortaroj en multaj ekster-eŭropaj lingvaregionoj. Kaj oni jam nun prenis la unuajn paŝojn por forigi tiun mankon. Tio estas memkompreneble salutinda agado kaj meritas la subtenon de ni ĉiuj.

Sed, bedaŭrinde, la situacio en kelkaj de tiuj regionoj, kiuj nombras inter la prabredejoj de Esperanto, troviĝas koncerne vortarojn aŭ lernilojn en simile danĝera kondiĉo.

Estas fakto kion ni eble pro pigro aŭ pro la ŝajne pli grava neceso de aliaj taskoj pretervidas, ke vortaro similas laŭ noveco al aŭtomobilo. Dum la unuaj jaroj post la aĉeto ĝi bone funkcias kaj satigas ĉiujn bezonojn postulatajn de ĝi. Sed post kelkaj jaroj, kiam oni estas devigata ĝin montri al la oficiala kontrolisto (TÜV) oni subite rimarkas ke ekzistas mankoj pli aŭ malpli gravaj.

Tiel la siatempe tute sufiĉa vortaro de Hans Wingen perdis de jaro al jaro valoron por ni.

Certe ĝi ankoraŭ funkcias por niaj plej urgaj bezonoj. Sed eĉ tie-ĉi la mankoj plimultiĝis. Oni serĉas vane vortojn de la nuna ĉiutaga vivo. Mankas Jeans, Vorfahrt, Rock, Cassetten-Recorder, dufto, Tee-mager, Datscha, Pulverkaffee (kiu povas pretendi traduki tiun Pulverkaffee rekte el la germana, kiam eble rekta traduko el la angla aŭ la franca estus pli trafa?), kaj multaj similaj terminoj. Tute ne estas la "kulpo" de sinjoro Wingen, kiu siatempe laboris konsciencie. Kulpas la progreso, la evoluo de nia socio.

Kaj tamen ekzistas ekz. "aquaplaning" aŭ "Wasserglätte" por la esperantisto. En ĉiuj landoj kie oni parolas la germanan kiel ĉefkomunikilo oni intertempe eltrovis novajn vortojn. Nur niaj vortaroj restis la samaj malnovaj (1954) kaj eĉ ne plu haveblas en librovendejoj. Estas speco de morta vivo por germanlingvianoj.

Kion ni bezonas, estas nova vortaro, speco de "Grande dictionnaire" germana-Esperanto. Se ne, germanlingvio baldaŭ apartenos al la aro de "evolujndaj landoj" en la Esperanto-movado.

Kio mankas estas la organizado de tia projekto, ĉar pro la kompleksa situacio de la germana lingvo mem, parolata ĉeflingve en kvar diversaj landoj, la tasko superus la kapablojn de solulo.

Estas la respondeco de niaj landaj asocioj antaŭzorgi pri niaj lingvaj bezonoj. Sed pli grave estas la respondeco de ni ĉiuj konscii pri la fakto ke ni apartenas al granda komunumo, kiu devigas nin interlabori, ni celas, labori kune kun homoj, kiu havas similan problemon. Mi esperas, ke eblos kunordigi la fortojn de aŭstroj, svisoj kaj germanoj el okcidento kaj oriento por tia grava tasko.

Mi proponas al la estroj de tiuj kvar landaj asocioj la kunordigon de fakkomisiono por tiu-ĉi tasko.

Mi pretus kunlabori.

Robert Kvasnák, Lichtenplattenweg 82, D-6050 Offenbach am Main.

Pilo-Press, Internacia Informservo ĉiusemajna, jara abono 30,-- DM
Pagoj al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉek-
konto Nürnberg 819 56-851, Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579
Österreichische Länderbank, Bregenz, 880.110.899/01/000, Schweizeri-
sche Volksbank, St. Gallen KK 629 240/0

La Welsaj kulturtagoj

Wels (pp) - De la 24- a ĝis la 27-a de junio 1976 okazis en la supra-aŭstria urbo Wels Esperanto-kulturtagoj. La Esperanto-elsendo de Radio Wien sur mallongondo disaŭdigis en sia elsendo de la 24/25 julio raporton de Emil Vokal pri tiu aranĝo, el kiu ni ĉi-sekve citas:

La Welsaj Esperanto-kulturtagoj, kiujn ni ripete anoncis, raportante ankaŭ per serio da artikoloj, pri ilia kadro, nome la historie digna, en la nuntempo ekonomie signifa urbo Wels en Supra Aŭstrio, pruviĝis, kiel atendite, rimarkinda sukceso.

La Esperanto-ekspozicio, aranĝita de mag. Oberndorfer kun materialo disponigita de la Internacia Esperanto-Muzeo Vieno sub la direkcio de d-ro W. Hube, estis alirebla al interesita publiko jam ekde ĵaŭdo la 24-a de junio. Vizitis ĝin ankaŭ du lernejaĵ klasoj.

La festkunvenon, kiu okazis la 26-an de junio, en la moderna festsalonego de la Laborista Ĉambro, salutis unue s-ano Ernst Moser, estro de la Welsa Esperanto-Grupo "Libereco" kaj iniciatinto de la tuta aranĝo, poste senatkonsilisto d-ro Leopold Grimme salutis en la nomo de la Aŭstria Federacio Esperantista, kiel ties honorprezidanto. La festparoladon, laŭ manuskripto de d-ro Karl Beckmann, prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio, malhelpita mem partopreni, prezentis ofickonsilisto Hugo Kraus, akcentante la feliĉan kombinon de historia kun moderna, antaŭvida konscio, kiu tiel modeleco manifestiĝas (nun ankaŭ) en la oficiala sinteno de Wels rilate al la lingva problemo kaj ties plej racia solvo per la internacia lingvo de Zamenhof.

Vicurbestro s-ro Werner Wigelbeyer, en siaj bonvenigaj vortoj, konstatis kontente, ke li, kvankam ne jam esperantisto, tamen multon komprenis de la aŭdita Esperanto-alparolo.

S-ano Josef Mraz, lerneja konsilisto el Linz, 81-jara, prezentis eldirojn de Edmond Privat pri la altvaloro kaj belsoneco de Esperanto, kaj enociite la belajn vortojn de la aŭstra poeto Peter Rosegger pri la gepatra kaj internacia lingvoj.

Sekvis kolorfilmo de ORF pri Esperanto en duagradaĵ lernejoj, kun komentario parolita de la prezidanto de la Viena Lerneja Konsilantaro, kortega konsilisto d-ro Hermann Schnell, kiu urĝe rekomendis al la gepatroj: "Sendu viajn infanojn al la Esperanto-kursoj!"

Plie oni rigardis kun sama intereso Esperantlingvan sonfilmon pri Nov-Zelando, liveritan de FIAT, kaj la jam famiĝintan filmon "La Kvina Fasado" pri la nova opereja domo de Sidnejo, Aŭstralio, same en Esperanto.

En la mateno de la sekva tago, dimanĉe, s-ano Walter Mudrak kaj f-ino Siglinde Stamm gvidis ekumenan diservon en la historie digna "Antaŭurba Paroĥa Preĝejo", tiel nomata ĉar staranta tuj antaŭ la iama orienta remparo.

Post amikeca akcepto en la muzikvendejo de s-ano Ernst Moser, centra urbplaco, oni montris al la gastoj, rondirante, la mezepokajn per arkadoj ornamitajn loĝdomojn, kaj aliajn el la multnombraj interesaĵoj, pri kiuĵ ni parolis en nia serio da artikoloj speciale dediĉitaj el tiu temo.

Fine ni menciis, ke sur la Foira Placo oni disdonis foliojn invitantajn al vizito de la Esperanto-ekspozicio, kaj ke dum la tuta festo okazis amikaj interparoloj inter la funkciuloj kaj membroj de la partoprenintaj Esperanto-organizoj.

Esperanto en Radio

Varsovio. La Esperanto-Ekspreso donis al la aŭskultantoj gravan aktualan informon: Kiel speciala sendito de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio redaktoro Jerzy Grum partoprenos la 62-an Universalan Kongreson de Esperanto en Ateno. Se ĉio funkcios, la unua rekta sonraportajo el Ateno kaj de la kongresa inaŭguro estos aŭdebla lunde, la 2-an de aŭgusto, matene je la 6-a horo kadre de la Esperanto-Ekspreso, sur la ondoj 41 m (7270 kHz); 49 m (6135 kHz); 75 m (3955 kHz) kaj sur mezondo 200 m (1502 kHz). Verŝajne - laŭ miaj spertoj en Nürnberg - la aŭskultebleco estos plej bona nuntempe sur la mallongaj ondoj, do 49 m, 41 m aŭ 75 m.

La programo de Pola Radio nuntempe estas kvazaŭ libertempeca. En la pasinta leterkesto mankis la statistiko pri la ricevitaj korespondajoj kaj ankaŭ la pasinta Esperanto-Ekspreso estis iomete magra. Zbigniew Lutogniewski, intervjuita de Jerzy Grum, rakontis pri siaj spertoj kiel turisto en Greklando kaj donis konsilojn al la UK-partoprenantoj. Jen denove montriĝas grava informa problemo: la manko de aktualaj informoj el la Esperanto-movado, aŭ ĉu vere nenio grava okazas? La redakcio alvokas la aŭskultantojn doni informojn pri aktualaj okazaĵoj. Sed ĉu vere la aŭskultantoj estas la plej taŭga kanalo por tia informado? Devus ekzisti reto de kanaloj tra kiu fluas la informoj de landaj kaj internaciaj asocioj, de regionaj kaj lokaj grupoj, de fakaj organizoj ktp. Mi konscias ke la Esperanto-movado dum la nunaj cirkonstancoj ne atingos tian idealan staton!

Vieno. La ĉi-semajna komentario temis pri la kapricoj de la vetero kaj la plendoj de la terkulturistoj, kiuj opinias, ke ili ĉiam ricevas tro malmulte da mono por siaj produktoj. La leterkesto donis aktualajn informojn kaj montris, ke dum la pasinta semajno alskribis la Esperanto-redakcion 16 personoj el 8 landoj. Estas akcentinde, ke de multaj alskriboj dependas la pluekzistado de la Esperanto-programo en la Mallongonda Servo de ORF. Esenca plimultiĝo de la alskriboj povus eĉ havigi pli oportunan kaj pli ampleksan elsendotempon. Skribu do al la Esperanto-Redakcio de ORF. La adreso nun estas jena: Esperanto-Redakcio de ORF, A-1136 Wien!

Mallongonda Servo de Sviza Radio. S-ro Gacond daŭrigis intervjui prof. Richard Wood el Usono, ĉi-foje pri la evoluo de la lingvopolitiko ĝenerala laŭ propraj spertoj de la intervjuito. La ĉi-semajna intervjuo traktas la fremdlingvo-instruadon en USONO. - D-ro Arthur Baur parolis pri la kontribuo de svisoj al la evoluo de Usono okaze de la 200-jara nacia festo de Usono.

Subteno por la Esperanto-Redakcioj

Nepe necesas ke la esperantistoj pli amplekse aŭskultu la Esperanto-elsendojn kaj pli efike subtenu la redakciojn por oftaj regulaj alskriboj kun komentoj, proponoj, kritikoj pozitivaj aŭ negativaj. Speciale dum la somera feria tempo estas necese atentigi la esperantistojn ne forgesi skribi poŝtkarton aŭ salutkarton.

Ĉi-sekve Pilo-Press denove publikigas la adresojn de radio-stacioj kun Esperanto-programoj kaj alvokas la legantojn skribi al la koncernaj redakcioj: Radio Zagreb, Esperanto, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio
Esperanto-Redakcio de ORF, A-1136 Wien, Aŭstrio

Radio Peking, Esperanto, Peking, Ĉinio

Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, I-00182 Roma, Italio

Radio Vaticana, Esperanto, Città del Vaticano

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.O.Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Poll.
Schweizerischer Kurzwellendienst, Esperanto, CH-3000 Bern, Svislando